

Aŭstraliaj Esperantistoj

Novajletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ

Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale

PLENUMITA 02/09/2021 Kvincentkvardekseka eldono (unua eldono 20/09/2011)



Subtenu vian Novajleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

Uzindaj ligoj [reta-vortaro](#) [Freelang Vortaro](#) [Plena Ilustrita Vortaro](#) [Duolingo](#)

[Google Translate](#) [Pasintaj AE eldonoj](#) [duolingo entute](#) [lingvohelpilo](#)

[Esperanta Retradio](#) [Esperanta himno](#) [PMEGramatiko](#) [openclipart](#)

Entute **815,000** lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas **281,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)

Nun studas **227,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)

Nun studas **202,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)

Nun studas **105,000** lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020)

Nun preparas Esperantan programon por ĉinoj. (Ekde decembro 2021)

(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917)

EKSTRAĴOJ ĈE LECIONOJ EN LA "THE ESPERANTO-TEACHER"

(de Mason Stuttard). N.ro 50 de "Por Komencantoj".

GRAMATIKAJ KVIZETOJ: Respondu al la jenaj gramatikaj demandoj:

- 1). Oni povas kombini (= adicii k.t.p.) per unu el la konjunkcioj: kaj, aŭ, sed, ĉar, escepte ke, krom ke. Ĉu en tia kombinita frazo troviĝas unu aŭ du predikatoj (= verboj)?
- 2). Kiom da konjunkcioj ekzistas?
- 3). La kvar unuaj linioj de la tria (lasta) strofo de la kanto "La Espero" tekstas jene:
 "Sur neŭtrala lingva fundamento, kolektiĝas pacaj batalantoj,
 "kaj rapide kreskas la afero, per laboro de la esperantoj."
 Kiuj estas la eventualaj ĉeffrazoj kaj subordaj frazoj kaj adjektoj?

Vi trovos la solvojn de la kvizetoj ĉe la fino de ĉi tiu gazeto A.E. numero 546. [Marcel Leereveld.](#)



La [Esperanta Retradio](#) donas bonan ĉirkaŭ-5-minutan aŭskultadon/legadon ĉiun tagon.

[Esperanta Retradio](#) [Scienca lingvo por Afriko](#) 30a Augusto



Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

" Kiel oni fariĝas ekskomencanto."

Duolingo. [La kurso kiu instruas kiel legi, aŭskulti kaj revizii.](#) Vi povas revizii je ĉiu tago de la semajno.

Surhavu vizaĝmaskon.

Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.

Homoj protektas aliulojn per la surporto de vizaĝmaskoj.

Nun oni kredas ke aeraj gutetoj estas la ĉefa maniero, per kiu homoj infektiĝas je la koronaviruso. Do portu maskojn. *Roger Springer*



Artikoloj por AE. Se vi trovas taŭgan artikolon por AE kaj ne fidas vian Esperantan nivelon, vi povas uzi la aŭtomatan tradukilon de Guglo kaj sendi ĝin rekte al AE *Roger Springer*

Google Translate estas bonega tradukilo por vortoj anstataŭ uzi vortaron. Metu la ligon sur vian ekranon.

3ZZZ

La elsendo de la 30a de aŭgusto estas dediĉita al literaturo kun la prelego de Nicolaŭ Dols " Kiel traduki poezion" , la fabelo " la kato kaj la ezoko" , la Dialogo de Julia Sigmund kaj la korea poezia ĝenro la siĝo *Amike, Franciska Toubale*



Nur la Ĉefministro havas la rajton decidi fari militon aŭ ne. Ne la parlamento

PM Gough Whitlam hejmgigis niajn militanojn el Vietnamujo

sen la permeso de Usono, do li perdis sian postenon neatendite.

[The forgotten coup - how America and Britain crushed the government of their 'ally', Australia \(johnpilger.com\)](#)

Estas grava ke Aŭstralianoj sciu ke Aŭstralio povus militi aŭ ne, laŭ la kuraĝo de Ĉefministro.

Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj“ korektitaj atingebblas je la suba adreso

[Ctrl+klaku la veran ligilon\)](http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo) <http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo>

Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

Universala baza enspezo (UBI)


Por pli kontentiga kaj sekura mondo

Ĝi helpus monon flui tra nia ekonomia sistemo sen senutila laboro



Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

Hazel Green



Malfeliĉe mi devas informi vin ke nia kara Hazel Green forpasis pasintan lundon (23/8/21)

Bv sendi kondolencojn kaj mesaĝojn al la edzo Paul kaj aliaj familianoj je la adreso :

al Paul Green, 44 Toowoomba Road, Oakey, QLD 4401

pgreen@icr.com.au 0458-911238

Sandor Horvath



Nia bonega amikino kaj esperantistino, Hazel Green, forpasis al regno multe pli alta kaj bona ol tiu ĉi, sur kiu ni momente vivas.

La bonega homo kaj esperantistino estis kuraĝiga kaj helpema, ĉiam ĝojoplena, bonhumora kaj kantema. Sendube ŝi sian tutan vivon faris sian plejbonan por plifaciligi la vivon de ni ĉiuj!

Ni deziras kuraĝon al ŝia edzo Paul. Sciuj, ke ŝi ne plu suferas. Nun ŝi ĝojas kune kun tiuj, kiuj iris antaŭen en la multe pli bonan mondon, la Mondon de la Spiritoj, la mondo, en kiun ni ĉiuj eniros!

Dankon kara Hazel, ĉar vi estis tia, kia vi estis!

Bob Felby

Fotojn de Hazel kaj florojn sendis **Linda kaj Petro Danzer**



SOLVO DE LA KVIZETO 49

(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917)

1). Du predikatoj. (ekzemple "Mi IRIS al la butikaro s e d mia edzino RESTIS hejme.")

2). Proksimume ses konjunkcioj.

3). ĈEFFRAZO: "(sur neŭtrala lingva fundamento) kolektiĝas pacaj batalantoj".

ĈEFFRAZO: "(kaj) rapide kreskas la afero (per laboro de la esperantoj)".

SUBORDAJ FRAZOJ: neniuj.

ADJEKTO: "Sur neŭtrala lingva fundamento".

ADJEKTO: "rapide".

ADJEKTO: "per laboro de la esperantoj".

Marcel Leereveld.



Ĉu la militaj industrioj de Usono bezonos novan militon por helpi la ekonomion?

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

El Brizbano Je la ĵus pasinta ĵaŭdo kelkaj el ni renkontiĝis, kiel kutime, ĉe mi por kafo kaj babilado. Ni ricevis ĉi-foje du neatenditajn surprizojn. La unua estas ke Claire ĉeestis (ŝi kutime laboras tiam), kaj la dua surprizo estis ke ŝi kunportis por ĉiuj ovojn. La ovoj estis interesaj ĉar inter ili oni trovis ne nur normalajn ovojn sed ankaŭ bluajn (de kokino) kaj eĉ iujn de koturnoj.

Doug Eising



Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

Kompleksaj Verboj en Esperanto

Iuj Esperantistaj gramatikistoj traktas la tri verbojn *povi*, *devi*, *voli* kiel apartan, konjugacie nekompletan, verbklason, kaj nomas ilin “modaj helpverboj” aŭ “modaj verboj”. Aliaj reliefigis tri problemojn pri tio:

- tiuj tri verboj ne estas helpverboj — almenaŭ, ili povas reteni sian tutan signifan valoron kiel ĉefverbo, ekzemple,

Ĉu vi volas [deziras kaj volonte konsentas] geedziĝi kun ĉi tiu persono? Jes, mi tion volas.
Jen, vi atingis la volatan [deziratan] rezulton.
Mi volas lerni rajdi biciklon, sed ĉu mi povos [kapablos]? Jes, vi certe povos [kapablos], kaj vi ja devos, ĉar la prezo de benzino tro altiĝos!;
- la kialoj ne akcepti iliajn pasivajn formojn estas manko de imagopovo, kaj la ekzisto de malpli longaj kaj malpli pezaj esprimmanieroj; kaj
- multaj aliaj verboj simile regas infinitivajn komplementojn.

Modaj verboj

Modo: Kategorio de la verbo, esprimanta la sintenon de la parolanto rilate al sia diraĵo. ☞ *indikativo*, *kondicionalo*, *optativo*, *volitivo* (PIV)

La ideo pri modaj verboj ellaboriĝis iom post iom, ŝajne en Orienteŭropo. Tiu ideo pli kaj pli akceptiĝis por la germana lingvo, sed ankaŭ adaptiĝis kaj akceptiĝis por similaj verboj en parencaj lingvoj, interalie la nederlanda, la skandinavaj lingvoj, la angla...

Konjugacie, tiuj verboj estas sufiĉe kompletaj en la germana kaj la nederlanda, iom nekompletaj en skandinavaj lingvoj, kaj tre nekompletaj en la angla.

Latinidaj gramatikistoj jen adaptis kaj adoptis tiun ideon, jen ne akceptis ĝin. Iuj similaj verboj ekzistas en kelkaj slavaj lingvoj, ŝajne aŭ eble pro influo de la germana lingvo. —(Aldridge)

Gramatika modo estas ĉefe kategorio de verba formo. Ĝi indikas la realecon, certecon, aŭ specon de nerealeco/necerteco. En Esperanto ekzistas nur kvar *fleksiaj* modoj:

- deklara, aŭ reala (kun tri verbotempoj, -is, -as, -os);
- ordona, aŭ vola (imperativo, -u);
- kondiĉa, aŭ imaga (kondicionalo, -us);
- infinitiva, aŭ neŭtra (infinitivo, -i).

La demandaj kaj neaj modoj en Esperanto montriĝas per la memstaraj partikuloj "ĉu" kaj "ne" respektive, dum en kelkaj lingvoj ili montriĝas per fleksio aŭ afikso. (WP-eo: Gramatika modo)

Kompleksaj verboj

Verboj kiel *povi*, *voli*, *komenci*, *fini*, *ĉesi* k.a. ofte aperas kune kun i-verbo. La du verboj kune formas kvazaŭ unu kompleksan verbon. Normale la i-verbo signife estas la pli grava parto, kaj ĝi decidas la frazrolojn (PMEG 30.11)

Tamen la ĉefverbo decidas la modon, voĉon, tensecon kaj aspekton de la tuta verba grupo.

En ekzemplo donita en PMEG, *Ili ĉesis konstrui la urbon*, la vortgrupo *la urbon* estas la komplemento de *konstrui*, kiu estas la infinitiva komplemento de *ĉesis*. Tiaj strukturoj estas rikuraj, t.e. oni povas enmeti pluajn infinitivojn. Konsideru la jenajn propoziciojn kun tri sinsekvaj verboj:

Ili devas povi helpi vin solvi problemojn... (CorpusEye: Eventoj)

Mi ĝojas povi esprimi al vi mian grandan dankon (CorpusEye: Bronte–Charlotte–Jane–Eyre)

Mi bedaŭras devi informi vin... (CorpusEye: Eventoj)

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

(ili)... *ŝajnis voli fortiri min de mia sidloko...* (CorpusEye: Borrowings-Edgar-Rice)

Maloŭte okazas kvarverbaj grupoj, ekzemple:

...do vi **povas ĉesi provi pruvi ĝin**. (CorpusEye: WP-eo)

Tie *ĝin* estas la komplemento de *pruvi*, kiu estas la infinitiva komplemento de *provi*, kiu estas la infinitiva komplemento de *ĉesi*, kiu estas la infinitiva komplemento de *povas*. La ĉefverbo *povas* montras, ke la verba grupo estas deklara, nuntempa kaj (semantike) daŭra kaj la voĉo estas aktiva.

La infinitiva komplemento ne ĉiam troviĝas tuj post la ĉefa verbo, ekzemple:

ni **konsentis inter ni neniam plu tuŝi tiun objekton**. (PIV)

Iuj Esperantistaj gramatikistoj asertis, ke la tri verboj *povi*, *devi*, *voli* formas apartan verbklason, sed ĉu ili havas unikajn trajtojn? Tra la jaroj iuj esperantistoj rimarkis, ke multaj aliaj esperantaj verboj uziĝas simile. Butler listigis ĉi tiujn verbojn, kiuj estas uzeblaj kun infinitiva komplemento: *amas*, *bedaŭras*, *bezonas*, *ĉesas*, *deziras*, *esperas*, *ĝojas*, *helpas*, *iras*, *konsentas*, *konsilas*, *lasas*, *malamas*, *malĝojas*, *memoras*, *permesas*, *plaĉas*, *planas*, *preferas*, *pretendas*, *promesas*, *rajtas*, *rifuzas*, *riskas*, *ŝajnas*, *timas*, *zorgas*. (Estas strange, ke Butler listigis la *as*-formojn: aliaj formoj estas same uzeblaj.) Tradicie oni konsideris, ke ses el tiuj verboj, *ĉesi*, *ĝoji*, *iri*, *malĝoji*, *plaĉi*, *ŝajni* estas netransitivaj. Do, la formo *verbo + infinitivo* ne limiĝas al transitivaj verboj, kaj certe ne limiĝas al *povi*, *devi*, *voli*.

Kia estas la komplemento de verbo?

Daŭrigi estas objekta verbo. Ĝia objekto povas esti ordinara o-vorto aŭ o-vorteca vorteto, sed ĝi ankaŭ povas esti i-verbo. Se la objekto estas i-verbo, ĝia senca subjekto estas la subjekto de *daŭrigi*...

Ofte oni diras, ke i-verbo post *ĉesi* estas objekto, sed tio ne estas ebla, ĉar *ĉesi* estas senobjekta verbo. (PMEG 31.8)

PMEG asertas ke la “objekto” de *ĉesi* estas komplemento, sed la difino de *komplemento* en PMEG estas sama kiel tio de *adjekto* en PAG, kie objektoj kaj adjektoj estas subaroj de komplementoj. La moderna tendenco inter lingvosciencistoj (ekzemple en la teorio pri valenteco) estas trakti objektojn kaj adjektojn (kaj eĉ subjektojn) kiel komplementojn. Do mi uzas la terminon *infinitiva komplemento* por ambaŭ.

Ni devus memori, ke participo ankaŭ povas havi infinitivan komplementon. Ekzemple:

Brunaj hundoj, ŝatantaj disŝiri pantoflojn aŭ iun ajn similaĵon... (CorpusEye: Monato)

Ĉinio per EU-dekreto estas devigata malebligi eksportadon de la skarabo, steriligante ĉiujn lignajn pakmaterialojn kontraŭ parazitaj (CorpusEye: Monato)

Klientoj, ne povantaj eniri tiun ĉi rakontan mondon, sendube postulos alispecajn librojn... (CorpusEye: Monato)

Ili estas supozataj povi kuraci preskaŭ ĉiujn malsanojn. (CorpusEye: Bergman-Sten-Tra-sovaĝa-Kamĉatko)

Helpverboj

La helpverboj de specifa lingvo ĝenerale formas fermitan klason, t.e. ilia nombro estas fiksita kaj relative malmulta. (WP-en, Auxiliary verb).

Helpverboj en diversaj lingvoj tipe helpas esprimi gramatikajn tenson, aspekton, modon, kaj voĉon. Ili ĝenerale povas aperi kune kun participo aŭ baza verbformo, sed en Esperanto ili aperas nur kun participo. Oni konsideras ke *esti* estas la precipa kaj modela helpverbo en Esperanto, sed aliaj kopulaj verboj ankaŭ povas agi tiel.

Verbotempoj Kompleksaj (malsimplaj, kunmetitaj). Ili formiĝas per la kunmeto de la aktivaj kaj pasivaj participoj kun la **helpverbo** *esti*. (WP-eo: Verbotempoj Kompleksaj)

Helpverboj en Esperanto helpas la participojn, kontribuante verbecon, tenson, kaj modon. Ekzemple:

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

Fiŝoj... estas kaptataj samtempe amase...(Corpus-Eye: Monato)

Ŝiaj poemoj iĝis konataj...(Corpus-Eye: Monato)

...li restas okupanta sin pri sia fiŝbastono...(Corpus-Eye: Monato)

Mi troviĝis baniĝanta en akvo ĝis la zono.(Corpus-Eye: Vallienne-Henri-Ĉu-li)

Ambaŭ ŝajnis dormantaj.(Corpus-Eye: PMEG)

La viro aspektis surprizata...(Corpus-Eye: Christie-Agatha-Murdo-en-la-Orienta-ekspreso)

Rolas tiel, de tempo al tempo, la verboj *esti, resti, ŝajni, aspekti, iĝi* kaj iuj *iĝ*-verboj (*montriĝi, troviĝi*, k.a.) Tio estas limigita, relative malgranda klaso.

Povi, devi kaj *voli* ne uziĝas tiel (*povas kaptataj**, ktp), do ili ne estas helpverboj en Esperanto.

La nombro da esperantaj verboj kiuj povas kun infinitivo formi kompleksan verbon sendube ne estas fiksita kaj ne estas relative malmulta. Kiel diris Bak Giwan: “Unue, la verboj ‘voli, devi, povi’ estas tute samaj kiel ordinaraj transitivaj verboj, prenante post si objektojn de ordinara substantivo aŭ infinitivo” .

Ĉirkaŭfrazoj kaj kunmetitaj pasivoj

“Oni neniam kreas pasivajn formojn de frazoj en kiuj la ĉefverbo estas *povi, devi* aŭ *voli*, kaj en kiuj la rekta objekto estas i-verbo” (PMEG, 27.3.1)

Laŭ PAG (116 d), “*povi* kaj *devi* havas neregulan pasivon. Anstataŭ *estas devate* oni diras: *estas necese, necesas*; kaj *estas povate* esprimiĝas per *estas eble, eblas*.” Pli ĝuste, *povi* kaj *devi* havas simplan pasivon (*povate* kaj *devate*), kiujn PAG citis, sed oni emas uzi ĉirkaŭfrazojn anstataŭ la regulajn pasivojn.

Mi notas ke *devas* kaj *necesas* estas iasence inversdirektaj unu al la alia. Simile *povas* kaj *eblas*. Ekzemple, en *li povas naĝi*, li povas kaj naĝi eblas.

La ekvivalentaj regulaj pasivaj esprimoj (*estas povate, estas devate*, ktp), laŭ mia scio, ne uziĝas en eŭropaj lingvoj, do oni imite uzas ĉirkaŭfrazojn ankaŭ en Esperanto.

La kunmetitaj pasivoj (ekzemple *devigata*) rezultas kiam la subjektoj de la du verboj ne estas samaj. Iu ekstere devigis iun agi. Ekzemple:

la profesoroj estas devigataj prelegi en la rusa lingvo (CorpusEye, Monato) (*oni devigis la profesorojn prelegi en la rusa lingvo*, kie *oni* estas la subjekto de *devigis*, kaj *profesoroj* estas la subjekto de *prelegi*.)

La verbo *devigis* havas du objektojn: *la profesorojn* kaj *prelegi en la rusa lingvo*. En ĉiuj pasivaj ekzemploj kiujn mi trovis, la substantiva objekto iĝis la subjekto de la pasiva verbo.

La participo *devigataj* tute ne estas malregula. Oni uzas ĝin ĉar la subjektoj de *devigis* kaj *prelegi* estas malsamaj. Se, en la ekzemplo, ni igu la duan objekton la subjekto de la pasivo, ni havus:

prelegi en la rusa lingvo necesas al la profesoroj

La rezulto de la devigo estas ke

la profesoroj devas prelegi en la rusa lingvo,

aŭ pasive ni povus logike diri:

*prelegi en la rusa lingvo estas *devate de la profesoroj*

kvankam multaj esperantistoj ne imagus tion. (En iuj aŭstroneziaj lingvoj, estas kutime uzi pasivajn formojn de iliaj ekvivalentaj verboj.)

Eĉ de vortoj, kiuj per si mem ne postulas la akuzativon, vi povas en nia lingvo libere ĉiam fari pasivon, se nur la senco de tiu ĉi pasivo estos komprenebla. (Zamenhof)

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

Pasivoj

La tri esperantaj verboj *povi*, *devi*, *voli* havas ĉiujn, regulajn, aktivajn formojn kaj ili povas havi infinitivan komplementon, same kiel multaj aliaj verboj.

Rajti (simile al *devi*), kaj *kapabli* (simila al *povi*) ne uziĝas pasive. Pasivaj ekzemploj de *deziri* (simila al *voli*) kun infinitiva subjekto estas raraj, sed ekzistas. Ekzemple:

*Se estas **dezirate** reprezenti pli da komplekseco, la komenca kaj la fina valoroj de nia transformo povas havi pli ol unu komponanton.* (CorpusEye, Monato)

Pasivaj ekzemploj de *voli* ankaŭ estas raraj, ekzemple:

*Fakte aranĝiĝas, sed ankoraŭ ne ekzakte, kiel **volate**.* (CorpusEye, Monato)

Jen ekzemploj kiuj uzas pasivon kaj kies aktivaj verboj havus la saman subjekton:

*...ne estas **bezonate** trairi la longan arbostrukturon de la sistemo...* (CorpusEye) kiun mi konvertis al la aktiva frazo: *oni ne **bezonas/devas** trairi la longan arbostrukturon de la sistemo...*

*estos **bezonate** ankaŭ pli sisteme agi...* (*oni **bezonas/devas** ankaŭ pli sisteme*)

*Nun jam **planite** estas, eksporti la filmon al la tuta mondo.* (*oni jam **planis** eksporti la filmon...*)

*Estas ankaŭ tre **dezirate** havi sian tombon en Gango.* (*oni tre **deziras/volas** havi sian tombon en Gango*)

Komparu tiujn kun ĉi tiu ekzemplo, kiu havas malsamajn subjektojn por la du verboj:

*estis **permesite** eliri el la malliberejo...* (*oni **permesis** ke iuj eliru...*)

Alia ebla kialo por heziti uzi pasivojn ĝenerale estas ke, pasivaj esprimoj ofte estas pli pezaj.

En la parola lingvo pasivo estas malofta. (PMEG 29.2)

Tre ofte povas esti rekomendinde elekti aktivan formon, ĉar aktivo ordinare estas pli simpla kaj pli rekta. Iaj iĝ-verboj similas al simplaj pasivaj verboj, kaj ili povas iafoje esti taŭga alternativo. (PMEG 28.4.2)

Do komparu la du frazojn:

*situas nur cent metrojn for de la lago..., kie **eblas naĝi**.* (Tekstaro: La Ondo de Esperanto)

*situas nur cent metrojn for de la lago..., kie **estas *povate naĝi**.*

La diferenco ĉi tie ne estas granda sed signifa.

Konkludo

Iuj esperantaj gramatikistoj provis raciigi la apartigon de *povi*, *devi* kaj *voli*, en specialan klason. Ŝajnas ke ilin influis eŭropaj lingvoj havantaj ekvivalentajn verbojn kiuj estas malregulaj. Tamen la malreguleco en Esperanto estas nur, ke oni emas uzi ne la regulan pasivon sed, anstataŭe, ĉirkaŭfrazojn aŭ inversdirektajn verbojn (ekzemple, *povi* → / ← *epli*). Ĉiuj aktivaj formoj de tiuj tri verboj uziĝas normale, do ne validas klasigi ilin kun la modaj helpverboj de iuj aliaj lingvoj.

La verboj *povi*, *devi* kaj *voli*, same kiel multaj aliaj verboj, povas uziĝi kun infinitivaj komplementoj por formi kompleksajn verbojn. Ili ne estas helpverboj. La kopulaj verboj estas la helpverboj en Esperanto (WP-eo: Verbotempoj_Kompleksaj); ili helpas doni verban sencon kaj atributojn al participoj. Tiuj tri verboj en Esperanto estas plenaj verboj.

Diversaj esperantaj verboj ne uziĝas pasive ĉar tiu senso, laŭ multaj esperantistoj, ne estas imagebla aŭ utila. Eble iun tagon iu elpensos taŭgan uzon por ili. En iuj aŭstroneziaj lingvoj, estas kutime uzi pasivajn formojn de iliaj ekvivalentaj verboj.

La admono de PMEG, ne uzi la pasivajn formojn de *povi*, *devi* kaj *voli*, estas bazita sur dubindaj premisoj. Mi esperas ke mi povis sukcesi pruvi tion.

Donald Rogers



Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

Referencoj

Aldridge, V.V., retpoŝto, 2021.

Bak Giwan, *Gramatiko de Esperanto*, Hanshin Eldonejo, Seoul, Koreujo, 1994. p 81.

Butler, Montagu C., *Esperanto-English Dictionary*, BEA, 1967, 438(d).

CorpusEye: <https://corp.hum.sdu.dk/cqp.eo.html> serĉita en Monato, Eventoj, Zamenhof classics, Esperanto literature.

PAG: *Plena Analiza Gramatiko de Esperanto*, K. Kalocsay kaj G. Waringhien, UEA, 1980.

PIV: <https://vortaro.net/>

PMEG: <https://bertilow.com/pmeg/index.html>

Tekstaro: La Tekstaro de Esperanto, <https://tekstaro.com>

WP-en: Wikipedia en la angla

WP-eo: Wikipedia en Esperanto

Zamenhof: *Lingvaj Respondoj*, <https://tekstaro.com/pl/prenitutantekston.pl?nomo=lingvaj-respondoj> **Donald Rogers**

Dekmonata Agadraporto pri la projekto VIEA en Benino.

"Volontula Instruado de Eo en Afriko" (VIEA)

Oktobre komenciĝis la tria etapo de la projekto "Volontula Instruado de Eo en Afriko" (VIEA) en Benino fare de Afrika Centro Mondcivitana (ACM Benino).

Je la fino de la dua etapo, lanĉiĝis la tria. Aubain Cocouvi EKON iĝis la tria volontulo.

Li deĵoris en kaj ekster la Centro de ACM Benino. Li instruadis dum dek monatoj kaj faris mirindan laboron: enkonduki kaj instruadi esperanton en la universitaton ST SALOMON kaj aŭdigi Esperanton en la publika universitato "ENSET". Li instruadis la lingvon dum 8/10 horoj semajne kaj la kursoj ankaŭ okazis en la kvartalo "Agnivedji", en la mezgradaj lernejoj "La Réussite" kaj "CEG Koudo". La tria etapo estas subvenciita de Esperanto-info/Céline Bernard. Dankon al Paul Dessailly kaj Antonio Filho, kiuj ankaŭ finance kontribuis. Entute la tria etapo englutis 800€ por kovri la vivsubvencion de la volontulo kaj la pago de skribiloj por la blanka tabulo. Ni tutkore dankas ilin pro la subtenado, kiu helpis nin realigi la trian etapon. Bv konatiĝi kun la faritaj agadoj per la jena ligilo: <https://www.facebook.com/groups/347708065924001/>

Apartan dankon al SAT-Amikaro kaj Esperanto-France, kiuj materiale subtenadas la projekton. Virtuala prelego pri la projekto okazis dum la SAT-Amikara kongreso.

La kvara etapo de la projekto komenciĝos oktobre. Ni invitas ĉiujn esperantistojn subteni la realigon de la kvara etapo de la projekto.

Raportis, **François Hounsounou**, Gvidanto de la projekto VIEA.



"Iu, kiu ne scias la veron, estas nur dikkapa. Sed iu, kiu scias ĝin kaj nomas ĝin mensogo, estas fripono.

Galileo

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE



(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917)



Ne penu ekstermi la Delta – viruson, ĉar

VI NE SUKCESOS.

Sed oni ne diris tion pri la same fortaj pesta kaj ĥolera epidemioj. Kial? Ĉar nuntempe multaj homoj perdus monon pro neeblo komerci. Ilia devizo estas: “Pli gravas nia komerco (= mono) ol la multekosta batalo kontraŭ la Delta-viruson. Kaj tiuj komercistoj ofte aldonas, ke tiuj viktimoj de la viruso ofte ĉiukaze mortus baldaŭ pro maljuneco aŭ malsano. Iu kristana partio helpas kompreni, ke estas normala kaj natura ke ni mortu iom pli frue, laŭ la natura leĝo de nombrobalanco kiu zorgas ke por kompensi por naskiĝoj devos okazi same multaj



mortoj je la alia flanko. Mi opinias ke ni povas havi pli da vivoj je la mortoflanko, ĉar en la nuna ekonomio la homoj povos labori multe pli mallonge kaj uzi tiun multan mallaboron por plezuraj kaj kulturaj priokupoj. Kaj tial ni rajtas plilongigi la vivon. Krome multe tro da



artikloj forĵetatas tro frue kaj anstataŭe la homoj devus malpli fabriki por pli savi la bezonotajn arbarojn kaj trinkeblan akvon por la estontaj generacioj.

La sinistra celo de la plendantoj estas redukti la nombron de nelaborantoj en la socio, kaj la virusoj solvos tion. Do ni nun bezonas la virusojn, kiuj ja helpas nin redukti la nombron de la senutilaj membroj de la socio. Kaj por tio ni ne bezonas tro multajn. Ni jam kreis la tutan nombron de nunaj viruskazoj per la socia pesto, la krimuloj kiuj ne obeas la regulojn de la viktoria registaro. Tiu pesto de homoj kreis ĉiujn viruskazojn en nuna Viktorio. Sen tiu pesto Viktorio havus nenian viruskazon. La konservativaj politikistoj (en la tri grandaj partioj) ne plendas pri tiu homa pesto en Viktorio. Kaj la viktoria registaro ne kapablas puni tiun homan peston. La ĉefministro esperas, ke sepdek procentoj da inokulado solvos la problemon, sed eĉ naŭdek-naŭ procentoj ne sufiĉos. **Marcel Leereveld.**

EL DE MIA ĜARDENO.

Ekzistas du specoj de citronarbetoj treege ofte kultivataj, la “Lisbon” citrono kaj la “Meyer” citrono. La “Lisbon” citronarbeto estas iom pli alta kaj vasta ol la alia, kaj ĝiaj fruktoj estas pli acidaj kaj iom pli grandaj. La fruktarbetoj ofte havas alternativajn jarojn de fruktokvanto. Sed en ĉi tiu jaro ambaŭ en mia ĝardeno strange fruktas: mi havas unu de ambaŭ specoj, kaj la Meyer portas nekutime grandan kvanto de pr. 240 citronoj, dum dek jam elfalis, dum la pli granda alia arbeto portas nur dekon da citronoj. Mi ne komprenas la kaŭzon, kaj la 250 Meyer-citronoj estas tre bonvenaj, precipe ĉe vizitantoj. Ilia plejmulto baldaŭ estos matura. Ili estas du el la nur kelkaj arboj kiuj kreskis sur nia terpeco de du akreoj antaŭ 55 jaroj, ĉar pro ĝia malriĉa grundo antaŭaj loĝantoj uzis ĝin por citronkultivado. Nun ĝi havas duoncenton da arboj kaj arbetoj, multaj eksterlandaj kaj kelkaj subtropikaj.



Marcel Leereveld.

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE